



KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA
KAJ KULTURA REVUO

NUMERO 2 (220)
APRILIO-JUNIO 2009
VOLUMO 43

2009 2

Editeur : MCE, Grésillon, 49150 Baugé, France.
Directeur de publication : Dominik Bertrand.
Imprimeur : D. Bertrand, MCE, Grésillon, 49150 Baugé.
Dépôt légal juin 2009. ISSN 1272-5188. 2 €.

Abonu Kulturajn Kajerojn por 2009

1^a paŝo :

Informu pri la poŝta adreso, kien ni sendu la revuon, al
Dominik Bertrand, 7, rue des Brûlis, 77320 Jouy-sur-Morin, France
« nasf2008@orange.fr »

aŭ al peranto.

2^a paŝo :

Pagu 10 eŭrojn, precizigante por kiu vi pagas, al
« Maison culturelle de l'Espéranto »
dum via venonta vizito al Greziljono aŭ al peranto.

Atentu :

Komence de jaro ni ne plu sendos la revuon al tiu, kiu ne pagis
sian ĵus pasintan jaron.

Kovrilpaĝo

Lilli Giloteaux vizitis Greziljonon en 1966, 1967 kaj 1969.

Ŝi desegnis ĉi kromdomon la 16^{an} de julio 1967.

Rimarku, ke nuna klasĉambro B ne jam ekzistis :

ĝi aperis nur en 1978 (K.K. 2008, p. 64).

Ankaŭ komparu al fotoj 1 kaj 3, K.K. 2009, p. 30.

Tiun bildon jam publikigis « Grésillon Kvindekjara
Jubilea Memorlibro 2002 ».

Niaj komputoroj uzadas nur liberajn kaj senpagajn programojn,
sen escepto, dank' al Linukso Ubuntu. Nia programo por enpaĝigi
estas Scribus 1.3.3 perfekte funkcia en Esperanto.

Kulturaj Kajeroj JARO 2009, NUMERO 2

HISTORIO DE LA KULTURDOMOJ

Sub la granda kverko de Greziljono : p. 30
Staĝo pri bindado.

KLERIĜADO

Historio : p. 33

Kurso de Lidja Zamenhof per rekta metodo.

Enkonduke al kurso per rekta metodo.

Botaniko : p. 42

Blua, blanka kaj roza.

Verkado : p. 46

Kreado de kantoj en Esperanto.

DISTRIĜADO

Biografio de laboristo : p. 51

Riĉa Edzo!

Ludo : p. 55

Kiam Tutokajmono vizitas Greziljonon.

Unua eldono laŭleĝe deponita en Francio en junio 2009. ISSN 1272-5188

Verkintaro :

Jean Amoureux, Dominik Bertrand, Lilli Giloteaux,

Klod Martins, Johana Schertzer, Lorenzo Tomezzoli, Lidja Zamenhof.

Provlegantoj : Jeanik Marolleau, Christian Rivière.

Direktoro de la revuo : Dominik Bertrand.

Staĝo pri bindado

Verkis kaj fotis
Johana Schertzer.

INTER la 1^a kaj 3^a de majo 2009 en la kastelo Grésillon ni kunvenis por partopreni al kreado-atelieroj. Pluvo kaj malvarmeco akompanis nin ĝis la pordo de la kastelo, kaj rehejmiĝis.

Vendrede matene ni dispartigis la staĝantojn, kaj komencis post la matenpaŭzo la bindad-staĝon. Dominik proponis fari bindaĵon el la kvar kajeroj de *Kulturaj Kajeroj* eldonitaj lastjare en 2008.



Foto 1. – Bindado estas tradicio en Greziljono.

Unue ni rigardis modelon, kaj bone observis la diversajn elementojn de la libro, kaj malkovris la atelieron kaj la ilojn.

Poste ni komencis la laboron : ni preparis la libretojn, bonsense ; ni kunkudris ilin (foto 1), ni gluaĵis la librodorson (foto 2).



Foto 2. – Dekstre libro estas kunkudrata, maldekstre librodorso ricevas gluon.




Foto 3. – Libro estas tranĉata.



Foto 4. – Librodorso estas rondigata.

Post sekiĝado, ni premis la libron en bindista premilo, por ties paĝojn rektigi per tranĉaparato (foto 3), kaj per martelo ni rondigis la dorson (foto 4).



Foto 5. – Fasonado de kovriloj.


Ni preparis la kovrilon, el kartono rigida por la du flankoj, el kartono fleksebla por la kovrildorso, kaj el tolo aŭ ledo. Ĉiu peco estas precize mezurita, perfekte tranĉita, gluaĵita, ordigita, por fasoni la iom krudan kovrilon.

Post novaj tranĉadoj de papero, gluadoj, ni daŭrigis la aferon.

La lasta delikata ago estas glui la libron en la kovrilon unua-flanke per la unua folio kaj dua-flanke per la lasta, sen falti la moligitan paperon.

Kaj post unu nokto aŭ unu tago de premado en premilo, ni kontrolis la liberecon de la folioj por la legado, eble per papertranĉilo. Jen la libro!

Foto 6. – Fina kontrolo.



Kurso de Lidja Zamenhof per rekta metodo

Verkis
Jean Amouroux.

LA PLI juna filino de doktoro Esperanto dediĉis sian bedaŭrinde mallongan kaj abomene ĉesigitan vivon (1904–1942) al disvastigo de la lingvo elpensita de ŝia patro.

De kiam ŝi ekkonis la faman instrumentodon de Andreo Cseh (Ĉe) ŝi entuziasmiĝis, kaj jam en 1930 ŝi diplomiĝis por instrui Esperanton laŭ lia metodo.

En 1920, en Rumanio, Andreo Ĉe devis gvidi kurson de Esperanto al diversnacia publiko. Li disponis ne librojn, nur tabulon kaj kreton. Li do imagis, ke la kurson li faros sub formo de konversacio, tre simpla dekomence. La lernantoj tuj parolis, ĉar Esperanto estis la sola uzata lingvo.

Kiam li instaliĝis en Nederlando kun la konata paro Isbrücker en 1930, kreiĝis la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto. La instituto formis pli kaj pli da diverslingvaj instruistoj de Esperanto kun la celo, ke ili instruu la lingvon en lando, kies lingvon ili ne parolis.

La 21^{an} de aŭgusto 1930 Lidja Zamenhof skribis al Julia Isbrücker :

« Mi sentas sinceran admiron al tiu vere genia pedagogo. »

Ŝi instruis en pluraj landoj, en Skandinavio kaj sufiĉe multe en Francio, ĉiufoje dum kelkaj semajnoj. Ekzemple, en Perpignan, mia urbo, ŝi alvenis la 9^{an} de februaro vespere. La provleciono okazis du tagojn poste, kaj la kurso finiĝis la 6^{an} de marto 1935. Tiam mi ankoraŭ ne naskiĝis!




Foto 7. – Adresparto de karto, el la getto de Varsovio, de Lidja Zamenhof al familio Isbrücker.

Interesa por nia Historio jen en la sekvaj paĝoj la teksto tute fidinde rekopiita (1) de ŝia prelegeto enkonduka al ŝia provleciono. Ŝian tradukanton, kiu poste ankaŭ klarigis iajn specifajn gramatikajn punktojn en la franca lingvo, ŝi nomis «sinjoro aparato». Li estis Robert Gendre (1907 – 1980), kies tradukita nomo estis Bofilo.

Estis do la 11^a de februaro 1935, en Perpignan. Memkompreneble, tiam la kunteksto ne estis la sama kiel nuntempe.

(1) La originalon ŝi konservis kaj legis en aliaj urboj.

Enkonduke al kurso per rekta metodo

Verkis
Lidja Zamenhof.

ESTIMATAJ gesinjoroj.

Mi tre ĝojas esti inter vi, en via bela lando. Antaŭ unu jaro en bela aŭtuna tago, mi forlasis mian hejmon. Mi iris norden al la skandinavaj landoj, akompanata de la bondeziroj de miaj amikoj.

Sed ne nur la amikoj deziris al mi feliĉan vojaĝon. Super mia fenestro, proksime al la tegmento, hirundo havas neston. Kaj, en la tago de mia forveturo, ĝi flugis preter la fenestro kaj haltis momente sur la parapeto. Ĝi ŝajnis ĉirpi :

« Ĝis revido. »

Mi ekpensis, ke ankaŭ tiu birdo ne restos tie longe. Ni disiĝas. Mi al la nordo, ĝi, kiam venos malvarmo, al la sudo. Kaj printempe ni ambaŭ revenos al nia komuna nesto. La hirundo rakontos al mi pri la varmaj sudlandoj. Ĝi rakontos pri la amasoj de aliaj hirundoj, kiuj kunflugis tien el diversaj nordpartoj kaj landoj. Ĝi alportos kun si eĥon de tiu grandega koncerto, kiun faras en harmonio birdoj el diversaj landoj. Tiam saman koncerton ili faradis harmonie antaŭ mil jaroj, kaj farados post mil jaroj.

Kaj kion rakontos al la hirundo mi? Eble mi devos humile klini la fieran homan kapon? Eble mi devos kun honto konfesi al la birdo, kio okazis antaŭ miloj da jaroj? kiel iam la prapatraj homoj volis starigi altegan turon por rigardi la vizaĝon de Dio? kiel ekkoleris la Nevidebla? kiel ĉe la ruinoj de l' turo Li konfuzis al la homoj la

lingvojn, por ke ili ne komprenu unu la alian kaj neniam atingu la ĉielon?

Kiel humilige estas por la homo! Li sklavigis la fortojn de la naturo. Li altigis sin super ĉiujn kreaĵojn, kaj tamen unurilate restis malpli alta ol ili.

Ĉar muta fiŝo en marprofundo komprenas alian fiŝon. Birdoj el diversaj nordpartoj kantas en harmonio. Eĉ ĉimpanzo el unu arbaro komprenas ĉimpanzon el alia arbaro. Nur homo, kiam li ekstaras kontraŭ sia proksimulo el alia lando, montriĝas muta kiel fiŝo.

Kaj dume la homa intelekto laboras, ĝi traboras montojn, ĝi tranĉas kontinentojn per la fervojaj reloj, ĝi faras ŝtalajn flugilojn, kaj mokas la leĝojn de gravitado, ĝi sendas foren sian voĉon sur la ondoj de l' Radio, ĝi elpensis telefonon, telegrafon, venkis spacon kaj tempon; kaj kia estas la rezulto? Jen tia, ke pli facile kaj rapide li (la homo) povas troviĝi en lando, kie li nenium komprenos, kaj kie lin neniu komprenos.

Ĉirkaŭverŝas nin kvazaŭ diluvo de lingvoj. Por ne droni en tiu diluvo ni bezonas arkeon. Jam estas konstruita tiu arkeo. Ĝia nomo estas Esperanto. Ĉiuj, kiuj en ĝin rifuĝis, ne timos plu la ondajn profundojn. La arkeo portos ilin sekure al la lando de reciproka kompreno.

Estis kaj estas ankoraŭ homoj, kiuj ne volas eniri tiun arkeon. Ili pensas:

«Eble montriĝos, ke la ŝipo havas ian fendon. Kial fari al si vanajn esperojn? Prefere mi dronu jam nun en la ondaro de la diluvo.»

Kaj ili mortbaraktas en la ondoj, dum aliaj velas trankvile al la promesita bordo. Sed estas aliaj homoj. Ili diras:

«Bone, mi supozu, ke mi atingos la landon de kompreno. Sed, kun kiu mi tie parolos, se enŝipiĝas ankoraŭ nek mia frato nek mia kuzo, nek mia amiko? Ili iru unue. Tiam mi ankaŭ aĉetos la bileton.»

La homoj, kiuj tiel rezonas, similas al la loĝantoj de unu malgranda urbeto. Antaŭ multaj jaroj oni enkondukis en tiu urbeto la telefonojn. Al ĉiu tre plaĉis la ideo, sed dum longa tempo neniu instalis ĉe si la telefonon. Ĉiu pensis:

«Kun kiu mi parolos, se nek mia frato nek mia amiko havas ankoraŭ telefonon?»

Multaj homoj estas tiel malrapidemaj, timemaj kaj atendemaj. Sed ekzistas ankaŭ alia tipo. Pli bona tipo. Tio estas la pioniroj. Ili iras unuaj en ĉiun nov-eltrovitan landon. Ili trahakas la vojojn tra la virgaj arbaroj. Ili batalas kontraŭ la bestoj de moko kaj insultado. Ili faligas la barojn de antaŭjuĝoj.

Ankaŭ Esperanto havis tiajn pionirojn. Priĵetataj per ŝtonoj kaj koto ili iris kuraĝe antaŭen. Dank' al ilia heroa penado alten leviĝis la stela standardo de Esperanto. Hodiaŭ la lingvo internacia sonas de nordo al sudo, de okcidento al oriento. Kaj hodiaŭ ni povas diri fiere, ke en Esperantujo la suno neniam subiras.

La valoron de ĉiu teorio pruvas praktiko. Kion montras la Esperanta praktiko? Jen ĝi montras ekzemple tiun ĉi libron. Ĝi ne estas romano. Ĝi ne parolas pri amo nek pri floroj. Ĝi entenas materialon tre sekan: adresojn. Nature, ne la adresojn de ĉiuj esperantistoj en la mondo! Por tio, ne sufiĉus dika volumo!

Ĝi entenas nur la adresojn de delegitoj – ne membroj, sed nur delegitoj de unu esperantista organizo, Universala Esperanto-Asocio. La mondo estas vasta, sed U.E.-A. kovras ĝin per densa reto. Kaj nun, se vi bezonas servon, ĉu proksime aŭ malproksime, ĉu en la dolara Usono aŭ en la kolora Japanujo, vi skribas al la delegito, kaj vi povas esti certa pri akurata plenumo de via peto.

Se vi estas vojaĝamantoj, estu certaj, ke samideanoj esperantistoj bonvenigos vin en fremda loko. Kaj, se vi preferas paperajn gvidlibrojn ol vivajn gvidantojn, jen ekzemple bela gvidlibro tra

Japanujo, jen alia tra Polujo. Pardonu, ke mi ne montrus pliajn, sed, se mi volus montri al vi ĉiujn, mi pagus tro multe por la transporto de mia bagaĝo.

Sed eble vi bezonas neniam servon ĉe la ekstretoj de la mondo. Eble vi volas simple vidi per la propraj okuloj kaj aŭdi per la propraj oreloj, kion taŭgas Esperanto. Eble vi volas simple scii, ĉu Esperante oni povas paroli kaj kompreni?

Jen vi havas ĉi tie malgrandan specimenon (pruvon). Mi ne scias vian belan lingvon. Mia tradukanto ne komprenas pole. Tamen vi vidas, kiel bone li komprenas miajn vortojn, kaj konsideru mem ĉu ni ne rajtas diri, ke ni forskuis de ni la malbenon de Babelo?

Kaj, se tiu ĉi specimeno ne estos por vi sufiĉe konvinka, mi povas doni al vi bonan konsilon. Iru al Esperanta kongreso. Tie vi vidos, kiel multaj, multaj homoj el multaj, multaj nacioj interkompreniĝas per Esperanto, kiel ili Esperante babilas kaj amindumas, referas kaj interkonsilas.

Kaj vi vidos plie, ke tiu reciproka interkompreno forlavas el iliaj koroj ĉiajn makulojn de ŝovinismo, ke en kompreno kaj simpatio ili formas unu grandan rondon familian. Kaj tiam plej skeptikaj el vi komprenos, ke Esperanto ne nur vivas, sed plie, ĝi donas novan vivon al la mondo.

Al kio celas ni esperantistoj? Ĉu ni volas sufoki ĉiujn naciajn lingvojn, por ke sur iliaj kadavroj eksidu, kiel sangavida drako, Esperanto? Neniam kaj neniel! Ni nur volas, ke en ĉiuj lernejoj de la mondo estu instruataj du lingvoj: la gepatra nacia lingvo kaj la internacia lingvo Esperanto.

Kaj ni celas al tio, ke dank' al lingvo internacia plena kaj vera demokrateco ekregu en internaciaj konferencoj kaj kongresoj.

Kaj ĉiam pli ofte en tiu kampo sonas Esperanto. Venos tempo, ke ĝi estos la sola lingvo de kongresoj internaciaj.

Kaj ni celas al tio, ke la potencaj ondoj de Radio, kiuj mokas la limojn kaj doganojn, ne perdiĝadu vane en la spaco.

Kaj la programo, kiun ni trovas tie ĉi en la gazeto *Heroldo de Esperanto*, montras, ke ĉiutage almenaŭ kelkaj stacioj dissonigas jam Esperantajn disaŭdigojn.

Kaj ni volas, ke la tiel potenca deka muzo, la filmo, ne suferu limigojn pro la lingva nekomprene. Kiel longe ĝi estis muta, ĝi estis vere universala. Kiam ĝi ekparolis, ĉu ĝi perdu la universalecon kaj



Foto 8. – Kurso de Lidja Zamenhof (meze de la dua vico)
en Perpignan. Je ŝia dekstro estas Robert Gendre
kaj je ŝia maldekstro estas René Llech-Walter (1906–2007).

limiĝu al naciaj kadroj? Jam antaŭ tri jaroj ni vidis dum la universala Esperanto-kongreso en Krakovo (1) la unuan Esperantan parol-filmon. Kaj la granda filmproduktejo Paramount promesas al ni pluajn produktaĵojn.

Kaj ni volas, ke la lingvo internacia helpu al la internacia trafiko kaj komerco. Multaj Komercaj Ĉambroj, sekvante la ekzemplon de la Pariza, uzas praktike Esperanton. Eble vi scias, ke la antaŭlasta universala kongreso de Esperanto en Parizo (2) okazis kun gravega morala kaj materiala helpo de la Pariza Komerca Ĉambro.

Tamen en nia standardo ni havas ne la flugilhavan radon de Merkuro, sed stelon. Tiu ĉi stelo estas simbolo de altaj aspiroj, ĉar ne nur al la praktikaj celoj ni direktos nian penadon. Ne, ni esperantistoj estas danĝeraj renversistoj! Ni volas renversi kaj ĵeti en rubojn tion, kio ekzistis sur la Tero de miljaroj.

De miljaroj inter la popoloj de la mondo staras dikaj, altaj muroj de malamo, naskita el nekompreneo. Ni ĵuris faligi tiujn murojn, kaj ni faligos ilin. Ĉar donante al la homoj la rimedon de reciproka kompreno, ni faligas la fundamentojn mem de tiuj muroj. Ili falu, por ke nenio dividu plu la idojn de la homaro, por ke la mondo iĝu unu granda hejmo, en kiu loĝas unu feliĉa familio, la homa familio.

Gesinjoroj, mi esperas, ke tiuj ĉi idealoj estas viaj idealoj, ke vi estos en la unuaj vicoj de nia esperantista armeo, ke tiuj el vi, kiuj ĝis nun ne konas Esperanton, ne hezitos nek prokrastos, sed tuj komencos ĝin lerni.

Mi esperas, ke, kiam mi revenos hejmen, mi povos sen honto saluti la hirundon sub mia tegmento kaj diri al ĝi, ke en la franca lando, el kiu mi revenas, mi komprenis kaj estis komprenata, ke la franca popolo laboras fervore, por ke unu fojon por ĉiam la malbeno de Babelo estu forigita el la mondo.

Karaj gesinjoroj, starante nun antaŭ vi, mi sentas min tre feliĉa, sed ankaŭ tre malfeliĉa, ĉar inter vi kaj mi staras muro, alta muro, dika muro. Sed mi estas kuraĝa, kaj mi esperas, ke ankaŭ vi estas kuraĝaj.

Ni eklaboru kune por faligi la muron. Kaj dum ni laboras jen sur la muro sidas unu persono, bona persono, inteligenta persono, li (la tradukanto). Tiu ĉi persono estas nia aparato. En la aparaton iras Esperantaj vortoj, el la aparato iras francaj vortoj. En la komenco ni bezonas la aparaton, sed poste ni ne bezonos ĝin plu, kaj ni dankos al la aparato, kaj ni metos la aparaton en la angulon.

Gesinjoroj, nun vi atendas la provan lecionon. Sed mi tute ne volas fari lecionon. Mi volas fari kun vi nur konversacion.

Ĉar mi ne konas vian lingvon, mi faros Esperantan konversacion, kaj laŭ la reguloj de la etiketo mi prezentas min al vi. Mi estas :

Lidja Zamenhof.

(1) En aŭgusto 1931. (Red.)

(2) En aŭgusto 1932. (Red.)

Blua, blanka kaj roza

Verkis
Lilli Giloteaux.

«**H**O! KIEL rave floras tiuj arboj!» entuziasme diras mia amikino dum aprila promenado tra la kvartalo Les Près apud Lille. En la printempa suno ĉarmis nin la rozkolora florabundo de tiuj sakuroj, ankaŭ nomataj japanaj ĉerizarboj. Ili apartenas al la prunus-familio.

La arboj, ne pli ol dek kvin metrojn altaj, originas el Japanio, sed jam de multaj jaroj troviĝas en Eŭropaj landoj. En Lille kaj ĉirkaŭaĵo, ili ornamas multajn stratojn, parkojn kaj ĝardenojn.



La floroj formas bukedojn el simplaj aŭ duoblaj petaloj. Malofte tiuj arboj produktas etajn nemanĝeblajn fruktojn. Ĉar la floroj sin montras antaŭ la kresko de la ovalformaj verdaj folioj, la florantaj

sakuroj aspektas vere pentrindaj. Bedaŭrinde la florado daŭras pli-malpli nur dek tagojn.


En majo mi ŝatas admiri la paŭlovniojn. Grupo de tiuj arboj kreskas en la suda parto de la parko Barbieux (en urbo Roubaix) kaj en pluraj stratoj kaj parkoj de la regiono.

La arbo atingas dek kvin metrojn kaj vestas sin per bluaj aŭ palvioletaj floroj. Ankaŭ la paŭlovnioj floras antaŭ la kresko de la grandaj koro-formaj folioj. La floroj konsistas el dudek ĝis tridek centimetrojn altaj starantaj grapoloj kun multaj sonorilformaj tubetoj.




Tiuj arboj devenas el Ĉinio, ili estas nuntempe plantitaj ĉefe en Sud-Eŭropo. En vintro la arboj estas facile rekoneblaj, ĉar iliaj duonfermitaj fruktkapsuloj restas sur la branĉoj ĝis la venonta printempo.

Samtempe floras la robinioj (*Robinia pseudoacacia*). La rapide kreskantaj arboj povas atingi altecon je dudek kvin metroj. Iliaj kurbaj trunkoj kaj branĉoj havas tre malglatan sulkiĝintan ŝelon.



La hejmlando de la robinioj estas norda Ameriko. Enkondukitaj en Eŭropo antaŭ-tre-longe, ili kreskas ankaŭ en nia regiono.

La floroj pendas laŭ grapoloj kaj forte odoras. Kutime la « falsaj akacioj » floras blanke. En urbo Villeneuve d'Ascq kaj aliloke mi



BIBLIOGRAFIO :


Lilli Giloteaux,
Arboj, 1994,
16 paĝoj.
Enhavas
63 arbonomojn
en 6 lingvoj.
Vidu eltrovaĵon
ĉi-apude.

Lilli Giloteaux,
Arboj en Aŭstralio
kaj suda Eŭropo,
1996, 20 paĝoj.
Enhavas
82 arbonomojn
en 6 lingvoj.

vidis rozkoloraj floroj, malpli oftan specion. La fruktoj estas en formo de guŝoj. La pinataj folioj konsistas el naŭ ĝis dek naŭ folietoj. Ĉe multaj robinioj kreskas dornoj sur la bazo de la folio. Ekzistas ankaŭ arboj sen dornoj.

Kiel junulinoj, Heidi kaj mi plukis robiniajn foliarojn, kaj forŝirante folieton post folieto murmuris :

« Li amas min kore, dolore, sincere, ne vere, li amas min kore, dolore... » ripetante tion ĝis la lasta folieto.



Bulvardo Latourette en urbo Forcalquier,
Francio, la 2^{an} de oktobro 2008.

Kreado de kantoj en Esperanto

Verkis
Lorenzo Tomezzoli.

JAM en la jaro 1979 mi ekkreis kantojn, komence en la franca, poste en Esperanto, kaj eĉ unu en la itala.

Mi devas konfesis, ke komence mi faris eraregojn lingvajn kaj eĉ pli da mallertaĵoj. Ekzemple, vidinte en iuj bildstrioj eraran elizion de «e» en la verbo «esti», mi naive kredis, ke tio estas normala, kaj mi faris same.

Do mi petegas, se vi havas emon krei ion utilan por Esperanto, ke vi kreu ĝin en bela senerara lingvo, ĉar kreanto en nia lingvo havas grandan responson! Pli precize: se iu ajn verkanto malbone uzas nacian lingvon, tio neniel malhelpas la lingvon, ĉar neniuj ĉesos uzi ĝin tial; male en Esperanto malbonaj verkoj povus esti eĉ lingvo-mortigaj!

Jen kelkaj konsiloj:

1. Ĉiam petu helpon, eĉ kiam vi opinias vin lerta. Persone mi eĉ ricevis plenan paĝon manskribitan da altvaloraj konsiloj de Ĝeorgo Lagrange. (Bedaŭrinde mi ne jam retrovis tiun dokumenton.) Ankaŭ nun mi neniam hezitas peti korekton de lertaj esperantistoj.

2. Bone atentu pri elizioj, kiuj estas permesitaj senprobleme por la finaĵo «o», sed nur en la vorto «la» oni povas elizii la literon «a». Atentu! neniam eliziu komencliteron.

Rimarko: kiam mi instruas Esperanton, kiel eble plej ofte mi uzas elizion, por kutimigi franclingvanojn bone loki la vortakcenton...

3. Ofta eraro nefarenda estas konfuzo inter «io» kaj «jo». Se ekzemple vi konsideras la vorton «familio», la silaboj estas kvar; do la plej aŭdebla silabo devas esti «li»; male, se vi finas la vorton dirante: «ljo», vi tute eraras.

Bone rimarku, tamen, ke eĉ bonega grupo, nome Kajto, foje tiel eraras; sed tio ne estu senkulpigo por imiti ĝin!

4. Alia tikla afero okazas kun la litero «ŭ», kiu ne estas vokalo. Ekzemple la vorto «preskaŭ» estas nur dusilaba, komenciĝante per forta «pres» kaj finiĝante per eta unusilaba «aŭ» sonanta kiel boĵeto de timema hundo.

5. Gravegas, ke la ĉefaj vortakcentoj akompanu la muzik-akcentojn. Fakte, kiel pritrakti la vortakcentadon en kantata teksto?

Laŭ simplaj akustikaj leĝoj, nur tri rimedoj estas eblaj por fortigi silabon: laŭteco, longeco kaj tono (en la mezaj frekvencoj, ju pli la frekvenco estas akuta, des pli ĝi estas aŭdebla).

Sed la afero estas iomete pli komplika, eĉ dum simpla parolado nekantata, pro la eco mem de iuj silaboj, interalie pro ties tembro (formo de la sona ondo).

Plej tikla ekzemplo estas eble la vorto «apud». Kiel elturniĝi, por ke «a» estu pli aŭdebla ol «pud»? Efiko de plifortigo de «a» havas sian limon, ĉar tiu silabo estas tiel malforta, kaj tiel mallonga! Plilongigon ne ĉiuj ŝatas. Uzo de tono pli akuta similigas la vorton al iu krio de birdego.

Bonŝance, en kantata teksto regas la muziko; sed kiamaniere?

Unue, ĉiu tono kaj longo dependas nur de la melodio. Rilate la fortecon, en dutempa kaj tritempa takto, la unua tempo regas, dum en kvartempa la unua tempo estas la plej forta, kaj la tria estas iomete malpli forta ol la unua.

6. Gravas eĉ la rimoj, kiuj prefere neniam estu samsignifaj. Ekzemple, se vi rimas per sufikso «ulo» kun «ulo», la dua «ulo»

Esperantaĵo (Ĉa-ĉaĉao)

Muziko : Bruno Bordin

Teksto : Lorenzo Tomezzoli

Piano

DO

SOL

DO SOL 7

DO

ki - am la vi - vo ne ri - de - tas plu dum vi ba -

rak - tas en mal - bo - na glu'

SOL 7

cer - te per kant' kun mil - da me - lo - di' la ĝoj - on

DO

vi - vi, jes re - tro - vos vi; aŭ - di - ĝu

FA

nun ti - a kan - tel', de la bon -

SOL 7 1/ DO

far - to, la se - kret' aŭ - di - ĝu

2/ DO

kret'

nepre devas esti ŝajnsufikso : la rimo de « fortulo » kaj « triangulo » estas bona, dum « bonulo » kaj « fortulo » seninterese rimigiĝas.

7. Tre utila kaj ĉefe tre efika estas rimvortaro. Persone mi uzas tiun de la dua duono de la *Parnasa Gvidlibro* de Kalocsay.

Finfine kaj konklude, jen lasta konsilo : kiam vi jam sukcesis fari ion interesan, ne hezitu, se la cirkonstancoj prezentiĝas, reuzi saman melodion aŭ, male, konservi saman tekston, ŝanĝante la muzikon.

Tiel mian kanton *Esperantaĵo*, kiun mi prezentas ĉi-tie, mi jam komponis franclingve sub alia titolo, en la jaro 1979, kiel polemikon kontraŭ franca politiko de tiu epoko... Ĉefe pro elmodiĝo, mi ne hezitis reuzi saman melodion por alia celo.

Esperantaĵo (Ĉa-ĉaĉao)

1.

Kiam la vivo ne ridetas plu,	dum vi baraktas en malbona glu',
Certe per kant' kun milda melodi'	la ĝojon vivi, jes, retrovos vi.

Rekantaĵo 1^a (dufoje) :

Aŭdiĝu nun tia kantet',	de la bonfarto la sekret'.
-------------------------	----------------------------

2.

Jen plia tago sen espero, ĉar	jam vi forgesis, ke nur per gitar'
Kun tia kant' laŭ milda melodi'	en via vivo venos idili'.

Rekantaĵo 1^a (dufoje) :

Aŭdiĝu nun tia kantet',	de la bonfarto la sekret'.
-------------------------	----------------------------

3.

La tempopaso reunigos vin,	ĉar tia estas nuna la destin'
De tiu, kiu en mezbona mond'	per Esperanto venas al la rond'

Rekantaĵo 2^a (dufoje) :

De la dancan-toj, dum la kant',	por disvolviĝ' de Esperant'.
---------------------------------	------------------------------

La Neordinara Vivo de teksisto tra la kvin kontinentoj

Riĉa Edzo !

Verkis
Klod Martins.

JARON 1950. Piedirante al kinejo ĉe Colisée en urbo Roubaix, Klod alparolas al Régine, kiu venigas lin al balo ĉe Colisée anstataŭ al kinejo. Tie dek du amikinoj ŝiaj lernigas al li dancarton. Klod ne plu iras al kinejo, li fariĝas sperta pri dancoj, kaj dancas ĉiujn sabatojn kaj dimanĉojn ĝis la tria matene. Pro manko de buso nokte, Klod revenas piede al urbo Hem kvar kilometrojn for. Foje li alvenas je la kvina, kaj, dum la patro leviĝinta jam matenmanĝas, Klod vespermanĝas antaŭ enlitiĝo !

Julion 1950, kun Etienne, Klod iras trajne ĝis urbo Langres, kaj biciklas laŭ vojoj sen-aŭtaj tra monto Jura. Sed apud urbo Doucier la paro perdiĝas en arbaro ! Klod suprengrimpas arbegojn kaj vidas elirejon. Kun biciklo enmane la duopo trairas densajn rubus-arbetojn ! Post purigo de la bicikloj ili nokte alvenas en vilaĝon sen lumoj. La duopo tendumas sur herbejo. Matene ili vekiĝas pro bru-ego kaj krioj, kaj konstatas, ke ili tendumas ĉe pordo de preĝejo ! Estas dimanĉo, la popolo iras al la meso !

Ili biciklas ĝis urbo Annecy, revenas ĝis urbo Dijon kaj trajne norden al Roubaix.

Julion 1951, en regiono Bretagne. Per trajno Klod iras ĝis urbo Lisieux, ankoraŭ kun Etienne. Poste survoje tri aliaj pedalas kun ili. Klod amuze levas la fingron por petveturi. Mirige kamioneto haltas kaj kunveturigas la kvin biciklojn kaj junulojn ĝis urbo Villedieu.

Post monto Saint-Michel la paro tranoktas en urbo Rothéneuf. La junulara domo estas eksa lumturo, do ĉirkaŭata de grandaj vitroj. Klod bruligas kinofilmojn por kuiri la vespermanĝon! Dumnokte okazas terura fulmotondro. Fulmoj trairas tiun vitran ĉambregon.

Alian tagon, bolantan akvon Klod ricevas sur siajn nudajn femurojn dum kuirado! Reveno.

Septembron 1951, Klod soldatiĝas du semajnojn en urbo Amiens. La armeo iras ĝis urbo Cayeux por pafi per kanono. Tuj post la alvoko de sia nomo sur la strando, Klod fuĝas ĝis kazino. Li dancas kun junulino, kiam subite frapon li ricevas sur la ŝultron fare de kapitano:

« Kion vi faras ĉi-tie? »

– Vidu, mia kapitano, mi dancas.

– Do bone amuziĝu! »

Klod revenas ĝuste por la alvoko de nomoj!

Julion 1952 en regiono Auvergne. Klod kun du amikoj iras trajne ĝis urbo Vichy kaj bicikladas tra montoj. Survoje la triopo trinkas bieron dek-tri-gradan. En deklivo la biciklo de Klod kolizias kun ŝtono, li falas, vundante siajn fingrojn, ĉe kiuj mankas unu centimetro. Lia estonta bofrato devas eligi la penison de Klod por urinado. Per pugnoj Klod biciklas ĝis urbo Saint-Etienne, kaj iras trajne al urbo Annecy, kie li mergas siajn fingrojn en la puran akvon de la rivero Fier por akceli cikatriĝon. La triopo per dentrela trajno Montenvers iras sur glacimonton Mont-Blanc. Tie Klod falas en glacifendon. Reveno al Roubaix.

Oktobron 1953. Klod fariĝas ĉefo en teksa fabriko Manche. Li ne somerumas por aĉeti aŭton. Tuj ĉe la unua provo li sukcese trapasas sian ekzamenon por stiri aŭton. Li mendas novan aŭton Citroën, sed devas atendi kvin jarojn antaŭ ol ricevi ĝin! Tial li tuj aĉetas jam ekuzitan aŭton Renault. Li estas inter la unuaj, kun firmestroj, direktoroj kaj komercistoj, kiuj posedas aŭton!

1954 en regiono Côte d'Azur. Dum tendumado petrola botelo uzata por varmigi manĝaĵon eksplodas kaj bruligas la herbojn. Klod sukcesas estingi la fajron. Uf!

El urbo Le Lavandou triopo da amikoj iras per boato ĝis insulo Levant, kie ĉe nudismejo ili promenas. Klod tuj senvestiĝas nude, sed ne la kamaradoj, kiuj hontas!

1955. Klod fianĉiĝas kun Renée, sep jarojn pli juna ol li, kiu interesiĝas pri lia salajro: Klod gajnas duoble rilate la aliajn.

1957, edziĝo en urbodomo de Tourcoing kaj en preĝejo de Hem. Pastro alvenas el sakristio kun ŝirita surpliso, sed, vidante luksan modistan robon, li eliras por surmeti pli decan!

Bankedo okazas en Roubaix. Renée vendas la brokantan aŭton dum dancado! Klod luis per letero ĉambron en ĉefurbo Bruxelles ĉe hotelo «La Concorde». La paro foriras aŭte. Klod scias, ke, se la motoro haltas, ne plu eblas refunkciigi ĝin! En Bruxelles, ne sciante kie situas la hotelo, kaj ĉar je la tria horo matene la stratoj estas senhomaj, Klod hazarde stiras laŭ iu bulvardo. Subite la motoro haltas! Ve! Klod levas la okulojn kaj legas: «Hôtel la Concorde». Estas miraklo! panei fronte al la celo.

Ĉar lacega, la paro ekdormas! Matene Klod brakumas sian edzinon, kiu nude duondormante prenas nudan Klod en siajn brakojn dirante: «Panjo!»

Policano telefonas al la paro, ĉar la aŭto staras sur taksi-parkejo. La kelnero ridas ĉar Klod lasis sur la aŭto bierkartonon skribitan «Paneo, ĉambro 10»!

Junion, Klod sukcesas trapasi sian ekzamenon por fariĝi inĝeniero pri ĵakardo, en lernejo ENSAIT, post tri jaroj da studado.

Julion, nun sen aŭto, la paro iras trajne ĝis urbo Le Tréport kaj tra Normandio biciklas, vizitante kastelojn kaj naturajn beliaĵojn, tranoktante en malmulte kostaj hoteletoj.

1958. Iro per trajno al urbo Saint-Brieux; tagmanĝo en tombejo! Biciklado laŭ norda bordo en Bretagne, sekve al sudo laŭ Atlantiko.

Matene kiam ili eniras trinkejon, deĵorantino ekkrias: «Ho! nepre vi estas gefratoj!» Fakte tridek-unu-jara Klod kaj dudek-kvar-jara Renée aspektas multe pli junaj.

Kiam ili revenas hejmen, en la leterkesto staras letero: «Via aŭto estas preta!» Klod atendis dum kvin jaroj sian Citroen 2CV.

Septembron, la paro aŭtas ĝis urbo Mers-les-Bains, kaj piede laŭlonge de la klifo promenas ĝis urbo Le-Bois-de-Cise. Tie ili vidas buson forirantan. Ve! Klod petas la horon de la venonta buso. Respondo: la 23^{an} de junio 1959, post ses monatoj! Fakte la busoj ne funkcias vintre.

Per sia aŭto Klod transloĝigas siajn havaĵojn al urbo Tourcoing, kie ili aĉetis apartamenton, pagante parton ĉiumonate. Klod transformas ĝin al stilo «Louis XVI» (Ludoviko la 16^a) dum kvin jaroj per abiaj lignoj el Sverige (Svedio). Sekve la paro aĉetas meblaron «Louis XVI», glasojn el kristalo, manĝilaron el arĝento. La tuton Renée enskribas je sia nomo, kaŝe de Klod! Jam delonge ŝi preparas divorcon!

Sekvota.

Kiam Tutokajmono vizitas Greziljonon

Verkis
Lorenzo Tomezzoli.

LA SOLVO de la unua enigmo (p. 28) estas: «Legu Kulturajn Kajerojn»!

Se vi sentas ŝveban ĉeeston de iu fantomo en la kastelo kaj ties ĉirkaŭaĵo, povus esti tiu de nia faraono esperantista, ĉar ofte li vizitas Verdan Grafinon, kaj flustre, dumnokte ili interbabilas. Poste, kiam mi ĉeestas, la statuo informas min, ĝian skulptinton, pri ĉio...

«Do (parolis Verda Grafino) jen daŭrigo pri la bonfaroj de la antikvula moŝto egipta, kiu interalie havis bonan ideon krei elementajn lernejojn por trejni hieroglifo-skribantojn...

– Nur skribantojn (demandis mi) kaj ne legantojn?

– Elementajn skribantojn, kiuj kapablas skribi ĉiun ideon... sed nur element-maniere, per simplaj signoj, kiujn tamen ĉiuj povas legi.

– Kaj male, mi supozas, ke elementa skribanto ne kapablas legi ĉiujn hieroglifojn skribitajn de eminentaj skribistoj; ĉu ne diskriminacio?

– Nur ŝajne, ĉar eĉ faraono ne aŭdacis kontraŭstari al la skribistoj, kiuj konsistigis klason ĵaluzan pri siaj privilegioj.

– Mi supozas do, ke li ruze kredigis al la skribistoj, ke li enŝovos neutilajn komplikaĵojn en la superajn nivelojn, tiamaniere ke la



popolo kreu, ke klereco estas kvazaŭ heredebla nur en la moŝta klaso.

- Kiel nuntempe ankoraŭ faras regantoj, kiam ili elektas naciajn lingvon cele al internacia hegemonio. Sed, tre bedaŭrinde por ili, estas bezonata por elementa lernado (de internacia lingvo) nur unu ŝtupo, kaj eble nur alia plia por plene atingi nuancojn kaj efikecon.

Rigardu do, kaj bonvolu diveni :

[illegible]

Nun ni rigardu pli detale la vokalojn kaj vokalidojn :

:	'	.	U	U	λ	∩	∩

– Klarigoj ŝajnas bezonataj !

- a, e, i, o, u, ũ, hiato, izolita o (ho!), eê germana ü!

-Tamen mi rimarkis, ke la simplaj vokaloj estas skribataj nur ĉe la komenco kaj la fino de la vortoj.

- Sed la vokalidon skribu eĉ en vortoj!

- Sed kiel fari kun elizioj, kies signo jam estas uzata?

- Prave. La solvon mi aldonis fine de la tabelo pri verboj :

[illegible]

Por helpi la divenon : la unuaj tabeloj ankoraŭ taŭgas, eĉ por la partikipoj ! »

Tiel finiĝas la elementa lernado pri hieroglifoj en Esperanto. Nun jen ekzerco de skribado laŭ faraonaj elementaj hieroglifoj :

«Jam en sia praepoko, la antikvaj egiptoj ŝatis trinki alkoholon.»

Bonvolu atenti pri la du hiatoj...

Sekvota.

— Verku —
Kulturajn Kajerojn

Kial vi ?

Ĉar en niajn paĝojn

Ne venas komencantoj kun eminentuloj, ne instruistoj kun lernantoj,
sed homoj kun homoj.

Pri kio ?

Por la parto « Historio de kulturdomoj » :

Studu la (eĉ proksiman) pasintecon de via preferata kulturejo ;
 Rakontu ĝin kiel eble plej neŭtrale, ne per opinioj sed per faktoj ;
 Ne provu priskribi ĉion : elektu simplan temon, klaran atakangulon.

Por la parto « Kleriĝado » :

Kleriku nin per viaj fakaj scioj.

Por la parto « Distriçado » :

Distru nin per rakonto originala kaj zorge konstruita.

Aŭ partoprenu nian anoncotan ludon.

Sed ne pri kio ?

Ĉar ni celas kleriĝadon, emancipadon, ni nenion publikigu pri :
politiko ; religio ; ekonomio ; pseŭdoscienco...

Krome estos rifuzitaj :

jam konataj tekstoj ; (plejofte) tradukaĵoj ; (nepre) krudaĵoj.

Kiel ?

Ĉe ni « verki » signifas : skribi, desegni, fotadi, komponi tuton...

Sendu vian proponon al

Dominik Bertrand, 7, rue des Brulis, 77320 Jouy-sur-Morin, France

« nasf2008@orange.fr ».